# Informilo

Monata revuo de F L A N D R A E S P E R A N T O - L I G O
Maandblad van V L A A M S E E S P E R A N T O - B O N D

Jarkolekto
~~Jaargang~~ N° 1 sept. 1981

~~Verantwoordelijke~~
Respondecas Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

---

01 OKT. 1981

L.S.,

Al ĉiuj kondolencplenanferi-reven-saluton !

Jes, finita la feriado! Ek, denove al niaj kutimaj okupadoj.

La estraro de FEL jam havis kunvenon kun tiu de FLEJA ... oni dirus ke la junuloj neniam ripozas.. Feliĉe por la movado, ĉu ne?

Alia ĝojiga fakto estas, ke iom post iom envenas reagoj al niaj diskut-artikoloj. Vi legos kelkajn en ĉi tiu numero.

Certaj reagoj okazis buŝe, el kiuj kelkaj jam sur baze de la artikol-projektoj.

Ni esperas, ke la reagoj ne limiĝos al tiuj kelkaj, sed ke pli kaj pli da personoj montros sian interesiĝon kaj ensendos siajn rimarkojn/sugestojn. Tiamaniere la inter-komunika kunlaboro povos nur pliboniĝi.

Ni ankaŭ intencas kompletigi nian bultenon per diversaj ne-tro-sekaj-ne-nepre-movadaj aldonoj. FLEJA jam promesis kunlabori, eĉ se estus komence nur per siaj protokoloj.

Interese estus povi publikigi personajn kontribuaĵojn kiel ese(et)ojn, tradukaĵojn, rakontojn ktp. Devas esti kelkiuj kapablaj verki ion en tiu senco. Ne hezitu do havigi al ni via(j)n kontribuaĵo(j)n !

Kiel jam dirite, la bulteno estas malferma al ĉiu, apartenas al ĉiu. Decus do ke ni kiel eble plej multope prizorgu ĝian enhavon.

Ek, do kuraĝuloj.

JB

INFORMILO
-----------------

Kadrogazeto. Aperas ĉiu-monate, krom en julio kaj aŭgusto.

Abono : BF 100,- jare
pagenda en la konton
001-0073007-42 de
Jan Bovendeerd, Mortsel
menciante "INFORMILO"

Kadromembroj de FEL ricevas ĝin senpage.

"INFORMILO" estas kontaktilo/ diskutilo inter la estraro kaj la membraro de FEL. Ĉiu povas partopreni en ĝi per personaj kontribuaĵoj. Tiuj ĉi kompreneble restu sub la respondeco de la kontribuantoj.

Tekstoj atingu la redakcion antaŭ la 10-a de la monato.

==============================

FEL - ŜPARKONTO
----------------------------

FIKSDATAJ MONDEPONOJ
--------------------

Minimumaj sumoj : BF 5.000,-

Minimuma periodo : 2 jaroj

- ĉu per pago en unu el la kontoj :
  402-7069801-50
  000-0265338-43
  menciante : DEPONO
- ĉu rekte al la Direktoro de ESPERANTO-CENTRO ANTVERPENO

==============================

LIBRO-SERVO SONORILO
Doornstraat 22
2610 WILRIJK
Direktoro : Monique VEREECKEN
Telefono : 031/27 24 05
Kontoj : 000-0152140-44
320-0342460-23

FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Arsenaalstraat 5
2000 ANTWERPEN
Telefono : 031/16 05 05
Direktoro : Paul PEERAERTS

====================================

FEL-estraro

Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
2180 KALMTHOUT
~~031/66 62 66~~
~~prezidanto, estrarano pri~~
informado, planado, agado

Roger DE SCHEPPER, Doornstraat 22
2610 WILRIJK
031/27 24 05
vic-prezidanto, estrarano pri financplanado

Jules VERSTRAETEN, St Bernardsestwg 1078
2710 HOBOKEN
031/27 66 43
estrarano pri financoj

Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14
2510 MORTSEL
031/49 50 06
ĝenerala sekretario, estrarano pri administrado kaj edukado

Fernand ROOSE, St Klaradreef 59
8000 BRUGGE
050/33 19 81
estrarano pri kulturo, respondeculo por Okcident Flandrujo.

René BUDTS, Pr. Rooseveltlaan 168/9
9000 GENT
091/ 23 53 48
respondeculo por Orient Flandrujo

Marie Thérèse HENQUINEZ, Lipsestraat 166
2991 TILDONK
016/23 61 90
respondeculo por Brabanto.

Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113
3538 HELCHTEREN
011/53 64 10
respondeculo por Limburgo

Kristin TYTGAT, St Hathebrandstraat 8
2510 MORTSEL
031/49 50 24
Kontaktoj kun la junularo (FLEJA)



GENERALAĴOJ

Nekrologo

Ni perdis ...

bonan amikon, ŝatatan viron, Eddie Frederickx, kiu la 4-an de aŭgusto estis viktimo de bedaŭrinda akcidento.
La novaĵo trafis nin kiel fulmo. Eddie, la ĉiam gaja, ĉiam afabla, ĉiam ridetanta, helpopreta, agrabla kamarado.

~~Eddie ... vi mankos al ni.~~

Nickie, kiom ni sentas kun vi, kiom trafas nin la nigra truo, kiun postlasis ĉe vi kaj viaj infanoj, tiu tragika akcidento.
Bonvole akceptu niajn sincerajn kondolencojn.

---------

BEF kongresos

Kiel jam anoncite en ESPERANTO EN BELGIO, dum la unua semajnfino de oktobro (03-04.10.1981) okazos en Bruselo la 2-a Federacia Kongreso.

FEL partoprenos tiun kongreson, kunvokante ĉiujn siajn administrantojn kaj kadromembrojn al ĝenerala administrantara kunsido, ĉar atendas nin gravaj decidoj.
Kelkajn diskuttemojn vi jam trovos en ĉi-numero. Bonvolu priekzameni kaj pripensi ilin por kiel eble plej bone kunlabori en la ĝenerala agadprogramo.

Ni jam dankas pro via ŝatata kontribuo.

> Ke ĉiu sin konsideru do invitita al tiu ĉi administrantara kunsido, okazonta en la tagmezo de sabato 3-a de oktobro en la kongresejo, Fortstrato 35 A, 1060 Bruselo (je ± 10 minutoj de la Suda Stacidomo.)
> La provizora programo antaŭvidas la kunsidon je 17.00 horo. Ni klopodos okazigi ĝin pli frue.

-------

Antverpeno.

En LA VERDA STELO okazis dum la feri-monatoj serio da interesaj "Internaciaj Vesperoj", dum kiuj rakontis diversaj klubanoj pri siaj spertoj eksterlandaj. La rakontvesperoj estis akompanataj de specifaj manĝaĵoj el la koncernaj landoj.

Jen vere laŭdinda iniciato !

AUBEL - 3-Landa - Renkontiĝo.

Tri-Landa- Renkontiĝoj estas sufiĉe regulaj. Tamen la ĉi-foja, kiu okazos la 19-an kaj 20-an de septembro en AUBEL, estas iom speciala. Ĝi nome estos okazo de inaŭguro de "ESPERANTO-ATELIER"-o fondita de la Provinco Lieĝo kiel kontribuo al pli da kooperado en la sino de EŬREGIO.

Prelegontoj estas :

- S-ro R. Remouchamps, Direktoro de la Kulturaj Aferoj de la Provinco Lieĝo kaj iniciatinto de la "Atelier"-kreo;
- S-ro G. Maertens, Prezidanto de UEA

S-ro M. Demonty, prezidanto de BEF

La entrepreno en si mem ŝajnas al ni pli ol sufiĉe interesa por meriti multnombran partoprenon.

--------

FLEJA alvokas ...

... ĉiujn grupojn al kunlaboro en la agado "VESTAĴOJ POR BONA ESPERO" (Bona Espero, tiu kolonieto en Brazilo)

Ĉefe mankas tie vestaĵoj .. por aĉeti i.a. nutraĵojn !

Ne forĵetu do uzitajn vestaĵojn, sed portu/sendu ilin al Esperanto Centro, Arsenaalstrato 5, 2000 Antverpeno.

FLEJA-estraro anticipe dankas nome de BONA ESPERO.

--------

FEL-organigramo

En nia organigramo bonvolu korekti jenajn adresojn :

- René BUDTS (estrarano de FEL kaj de la Genta Grupo LA PROGRESO)
  Pr. Rooseveltlaan 168/19
  9000 GENT     Tel. 091/23 53 48
- Herman VAN EYNDT (estrarano de ESPERANTO 2000 - Leuven)
  Vaartsraat 47
  3000 LEUVEN

---------

UNIVERSALA KONGRESO 1982

Ni ĵus aŭdis, ke S-ro Willockx, ministro de PTT., akordiĝis pri la eldono de speciala poŝtmarko okaze de la UK 1982 en Antverpeno.

Pri la preparlaboroj ni ankaŭ aŭdis ke ... mankas homfortoj. LKK alvokas al ĝenerala kunlaboro. Bonvolu kontakti tiurilate S-ron DE SCHEPPER, Doornstraat 22, 2610 WILRIJK.



## D I S K U T - A N G U L O

Kelkaj konsideroj pri ... Ĉu FEL iru novan vojon ?

Dum renkontiĝoj ĉiam trafas min, ke la ĉeestantaro konsistas plej grandparte el instruistoj, akademianoj kaj oficistoj. Maloftas laboristoj kaj preskaŭ komplete mankas komercistoj. Tipe por tiu ĉi lasta kategorio estas, ke - en la praktika vivo - ili komplete dependas de sia propra diligenteco, inventemo, organizkapablo, dinamismo ... por sukcesi. Ankaŭ instruisto, oficisto, ... povas havi tiujn kvalitojn. Sed ili eble tro multe kutimas fidi je la preparado de laborterneno per aliaj homoj. Instruisto povas ekz. permesi al si por diri : "Mankas lernolibroj, do provizore mi ne instruas", sen perdi salajron. Se komercisto dirus : "Mankas al mi varoj, do mi ĉesas labori", li tuj perdus sian vivrimedon!

Se mankas komercistoj inter la Esperantistoj, ni tamen provizore povas lerni de ili. Kelkaj tipaj ideoj komplete diferencigas ilian labormanieron de la nia :

1. Komercisto nur entreprenas ion, kio certigas al li netan gajnon. Li investas kapitalon por havi pli grandan profiton.

La celo de kultura movado ne estas gajni monon. Sed ni eble devas UNUE atenti profitigajn agadojn kaj NUR POSTE uzi la profiton por instigi forgesitajn facetojn en la E°-kulturo.

2. Komercisto ne voĉdone elektiĝas. Tamen lia sukceso estas eble pli demokrata pruvilo pri bona laboro.

En movado, kiu fundamentas sur la laboro de libervoluloj, oni ne povas apliki tiun sistemon. Sed pripensi nun iomete la sistemon de voĉdonado, kiun oni aplikas en La Verda Stelo. Ĉiun trian jaron ĉiuj membroj aŭtomate estas kandidatoj por fariĝi prezidanto. Ĉiu membro ricevas voĉdonilon kaj notas 3 nomojn laŭvole. Tiel oni aŭtomate elektas iun, kiu jam iel sukcesis anstataŭ hazardan kandidaton.

3. Komercisto elektas taŭgajn kunlaborantojn, oficistojn kaj ne konsultas sian klientaron ĉi rilate per voĉdonado.

Laŭ simila pensmaniero, la prezidanto en LVS elektas siajn estraranojn. Oni ne voĉdone elektas ilin.

4. Komer-cisto ne petas konsenton por ĉiu paŝo, sed agas aŭtoritate (= rapide, efike).

En komerca entrepreno, la komercisto ja laboras nur por propra profito. En movado, oni laboras per la mono de aliaj homoj. Tial ne eblas neglekti

la opiniojn de la estraro, komitato kaj membraro. Aliflanke, mi jam aŭdis kaj spertis, ke oni ofte eluzas preskaŭ ĉiuj disponeblan tempon kaj energion por demokrate kunvenadi, diskuti, kvereli... pri decidoj, kiuj poste neniam efektiviĝos. Tial mi pledas por kiel eble plej granda decidpovo de la prezidantoj.

5. Moderna komercisto ne tiom atentas pri la foresto de klientoj, sed strebas al ĉiam pli granda kvanto da novaj aĉetontoj. Li tiucele antaŭvidas grandan sumon por reklamo!

Simplega rezonado klarigas al ni, ke inter 5 novaj E°-kursanoj preskaŭ **certe ne troviĝas nova, gvidema, agema persono; inter 500 certe jes!**

6. Moderna komercisto konsciiĝas ĉiam pli kaj pli pri la neceso de honesta reklamo, informado.

Supozeble ni perdas amason da E°-lernantoj, ĉar tiom da homoj tute ne trovis la plenumon de la servoj, promesitaj en niaj informfolioj. Ĉu ne estus pli efike emfazi en la informado ke ni serĉas precipe iniciatemajn, agemajn homojn, kiuj pretas malhelpi la grandajn vakuojn en la E°-movado. Ni pensu foje pri aro da novaj movadoj, kiuj rapide kreskis en la lastaj jardekoj, ĉar ili daŭre apelacias al la bonvolo de la homoj.

Ivo Durwael.

----------------

Kaj ni daŭrigu ...

ĈU HAVAS SENCON TIO, KION NI FARAS ?

Kion homo nuntempe jam ne faras! Pli multe li penas pri kiel pasigi sian tempon ol pri sia vivtenado kaj, ju pli da libera tempo li havas, des malpli da tempo restas al li por fari ion senchavan. Nuntempe pleje gravas scipovi "ludi" (ian "sporton"?) aŭ almenaŭ doni la impreson pri tio, doni la impreson pri graveco, pri grandeco. La homo volas brili, elstari, imponi la najbaron kaj ĉio taŭgas por tio. Nur malmultaj, ege malmultaj elstaras per sia inteligenteco.

Ne miskomprenu! Intelekto ne nepre implicas inteligenton !. Memoru nur la proverbon : "Ofte kovras kapon de saĝulo, ĉapo de kampulo." (Z)

Se ekzemple ni apartigas :

- la homojn al kiuj sufiĉas bela domo, bela aŭtomobilo, eventuale kun tenis- aŭ ski-ekipaĵo;
- la homojn kiuj milope "praktikas" sporton, ĉefe plenigante sin per biero post la spektado;



PROTOKOLOJ

01 OKT. 1981

FLEJA - estrarkunsido de 22 08 1981

Ĉeestas : Gerd JACQUES, Kiki TYTGAT, Luc POTIAU, Jean Pierre VANDENDALE.
Petis senkulpigon : Frank PLATTEAU, Wim TYTGAT, Danny VAN DAELE (vojaĝo)

TAGORDO

1. Financoj :

La librotenado estas oficiala ekde la momento kiam FLEJA fariĝis **asocio sen profitdona celo.**

Buĝeto 1982 : vidu la protokolon de FEL.

FLEJA povus pruntedoni monon al IJK kiam ili deziras tion (komenckapitalo)

Vojaĝsubvencioj : regulo por la repago de vojaĝkostoj (la totala disponebla sumo estas 15.000 BF.):

= laborkunvenoj : repago de la duono de la vojaĝkostoj. Disponebla sumo : 10.000 BF por ĉiuj laborkunvenoj.
= estrarkunvenoj : repago de ĉiuj kostoj super 100 BF (maksimume 500 BF) disponebla sumo : 3.000 BF.
= vojaĝoj por borsoj, varbado ktp.: repago de ĉiuj kostoj ekde 101 BF (maksimume 500 BF). Disponebla sumo : 2.000 BF.
= internaciaj semajnfinoj kaj kunvenoj aliaj ol supre : kompleta repago laŭ ricevitaj subvencioj por repago de vojaĝkostoj (ekz. Hoher Knüll).

Tiu ĉi regulo validas por ĉiu aparta vojaĝo.
Estrarano por financoj, L. Potiau (21.08.81)

2. Kongresoj :

- BEF : starigi kunlaboron kun valonaj junuloj. Mankas grandskala kaj detala informado pri tiu ĉi kongreso laŭ Kiky. Tamen espereble multaj personoj partoprenos ĝin, ĉar estas la nura landa kongreso en la jaro.
- IJK : preparado de aliĝiloj kiujn la aliĝontoj devas ricevi antaŭ la 15-a de januaro 1982 (fino de la unua aliĝperiodo). Distribuo prefere ekde 1-a de oktobro 1981. Kotizoj pagotaj en UEA-konton.
- UK : preparado de la ejo (Kloosterstraat/Antwerpen, se ni povos lui tiun lokon) kaj luado de tendoj. Kiu scias kiel trovi tablojn, seĝojn kaj telerojn malmultekoste luatajn?
  = Preparado mem de la matenmanĝoj por malaltigi la kotizojn.

= Ne-esperantistoj kiuj venas por pretigi al la IJK-anoj la matenmanĝojn, pagos mem la dormadon kaj manĝojn.
= Kiu havas ideojn por junulara posttagmezo kiu okazos antaŭ la IJK Loveno?
= Stampilo kaj leterpapero kun la insigno de la IJK devus esti faritaj. Kiel eble plej baldaŭ, ĉar ni jam povus uzi ilin. Gerd priparolos tion dum la sekvonta LKK-kunsido en Leuven (27 08 1981).
Estos specala taga poŝtstampilo dum IJK. Ĝi povos esti uzata sur poŝtmarkoj specialaj de la UK.
= Garantia kapitalo :
La diversaj flandraj kluboj povos garantii kapitalon por IJK-agado. Tiam ni devos komenci varbi por nia IJK ekde septembro en la kluboj por ke homoj pretu garantii etan sumon por nia IJK. Gerd priparolos tion en Leuven (27 08 81).
= Lichtaart : Ankoraŭ mankas la raporto de Frank Platteau pri tio.

3. Revuoj :

FLEJA-letero pri ĝeneralaĵoj de la FLEJA-agado kaj demandoj por la FLEJA-anoj. Kune kun la FLEJA-protokoloj ĝi aperos en INFORMILO en FLEJA-paĝo. (redaktado Jean Pierre VdD). Tio decidiĝos posttagmeze dum la komuna FEL/FLEJA-kunveno (vidu ankaŭ FEL-protokolon). Ĝis kiam INFORMILO ne estas sendita al ĉiuj FLEJA-anoj, la FLEJA-paĝo/letero aperu en JEN.

4. Diversaĵoj:

- Centra FEL-servo - reorganizado de la administrado:
Gerd legas leteron pri la reorganizado de la kotizpagado.
Foje kasistoj forgesis pagi la FEL-kotizon ĉefe ĉar la kotiz-tabelo estas komplika. Por eviti tion ĝi faciliĝu kaj la pagado centraliziĝu.
Proponoj : duonigi la FEL-repago (35 BF) por ĉiu klubano al neaktivaj grupoj.
kompleta FEL-repago (70 BF) por ĉiu klubano al grupoj kiuj prizorgas minimume 6 aktivecojn (ekspoziciojn/kursojn:kunvenojn ktp) ĉiujare.
anstataŭigi lokajn gazetojn per unu flandra esperanta gazeto (INFORMILO) Avantaĝoj : malpli da financaj elspezoj, unu redakcikerno.
- Infana ĉambro en la Hodler-domo (Frankrijklei 140, A'pen) se la luprezo de tiu ĉi ĉambro ne estas tro alta, FLEJA povos instali infanĉambron



en la Esperanto-domo. Ni petos tion al Hodler. Tiu ĉi ĉambro povus esti uzata por kunvenoj de junuloj inter 13 kaj 16-jaraj kaj ankaŭ kiel ludejo. Kiu havas ideojn pri aktivecoj kaj ĉambrinstalaĵo ?

5. Turismo :

Esplori la eblecojn por kunlaborado kun junularaj turismaj entreprenoj (por vojaĝi eksterlanden). Tamen ekzistas problemoj pri la forveturado kaj reveno je la sama momento.

Fino : 13.00 h.

Protokolinto : Jean Pierre VandenDaele.

---

Komuna estrar-kunsido FLEJA/FEL de 22 08 1981 en Antverpeno.

Ĉeestas : por FLEJA : Kiky TYTGAT, Gerd JACQUES, Luc POTIAU kaj Jean Pierre VANDENDAELE
por FEL : Marie Thérèse HENQUINEZ, Paul PEERAERTS, Roger DE SCHEPPER, Jules VERSTRAETEN, René BUDTS kaj Jan BOVENDEERD.
Petis senkulpigon : Edward SYMOENS, malsana.

Prezidas : K. Tytgat
Protokolas J.P. VandenDaele kaj J. Bovendeerd.

Malfermo 14.15 h.

La prezidanto enkondukas la kunsidon bonvenigante la estraranojn de FEL kaj klarigas la planon kaj la ideojn,kiuj vivas en la junularo (TEJO) Ŝi referencas al la seminario de junio 1980 en Strasburgo, al kiu partoprenis TEJO kaj kiu temis pri la estonto de la movado. Pri tiu seminario ekzistas tre detala raporto, havebla (?) en la Esperanto-Centro.
La junularo laboras al tiu programo, post decido ne lasi la aferon tiel kaj jam kunvenis kelkajn fojojn por ellabori tiun planon en la tiel nomataj laborsemajnfinoj en Nederlando.
Specialan antenton en tiu plano ricevas la movado de la 1980-aj jaroj.
Jam stariĝis laborgrupoj pri kiuj temas en la protokoloj de la FLEJA-kunsidoj, kiujn ricevas la estraranoj de FEL.

Dua seminario okazis en 1981 en Strasburgo, sed tiu ĉi ne temis pri E-o. Tria seminario okazos de 19 ĝis 26 09 1981 en Lille. Ĝia temo : "Lingvo kaj komunikado kiel homaj rajtoj".

Ankaŭ en Raŭma (IJK 1980) TEJO skizis agadprogramon por la 1980-aj jaroj. Vidu en tiu rilato la "Raŭma Manifesto"-n.

Post tiuj deklaroj, ŝi transiras al la

T A G O R D O

1\. Buĝet-projekto de FLEJA (raportas Luc Potiau)

1.1. La buĝeto estas deficita pro diversaj kialoj, i.a. pro la altiĝo anoncita de la poŝttarifoj, la administraj kostoj rilate al la protokolado kaj dissendado de la protokoloj kaj alia informmaterialo.

1.2. JB opinias, ke detala priekzameno kaj ellaboro de la la buĝeto estas afero de la financa komisiono.
Aprobite.

1.3. Decidiĝas inter la membroj de la financa komisiono (JV kaj RDS) organizi kunvenon kun FLEJA-estraro.

2\. Komuna agadprogramo

2.1. raportado pri la matena FLEJA-kunsido

2.1.1. La kunsido ekzamenis kaj pridiskutis la de JB dissenditan projekton de diskuttemo por la venonta administrantara kunsido de FEL okaze de la oktobra BEF-kongreso, rilate al la reorganizado de la administrado.

2.1.2. FLEJA principe konsentas kun la propono en sia tuto.

2.1.3. Rilate al proponita divido de la kotiz-enspezoj, FLEJA preferas tiun pri aljuĝo al la grupoj kaj de iu % kaj de subvenciado de la aktivecoj.

2.1.4. Pliaj detaloj surtabliĝas, sed estos enstrukturitaj en la artikolo kiam ĝi aperos en INFORMILO.

2.1.5. JB laŭdegas kelkajn aldonaĵojn al la artikolo rilate al la unuaj paŝoj farendaj.

2.2. Kongresoj.

2.2.1. BEF - Federacia kongreso 03-04.10.1981 en Bruselo.

2.2.1.1. La prezidanto demandas klarigojn rilate al la celo kaj signifo de la venonta kongreso.

2.2.1.2. JB klarigas, ke fakte BEF ne havas praktikan signifon, almenaŭ ne por FEL. Se ĝi estas viv-tenata, tio estas ĉefe por permesi al S-ro Maertens financi sian Eŭropa Esperanto-Centro-n en Bruselo.

2.2.1.3. FLEJA plendas pro la fakto, ke ili nenion sciis pri la kongreso, krom tion kio troviĝas en la aliĝilo, aldonita al ESPERANTO EN BELGIO.



2.2.1.4. Neniu ricevis ion pli, laŭ JB.

2.2.1.5. La prezidanto tamen trovas sencensa organizi BEF-kongreson, se BEF tamen ne estas reala.

2.2.1.6. JB (kiu estas ankaŭ sekretario de BEF) agnoskas la sensencan situacion, sed opnias, ke se BEF devas plu-ekzisti pro kiu ajn kialo, io devas okazi kaj la plej eleganta maniero por tio, estas organizi kongreson por krei renkontiĝ-eblecon por ĉiu.

2.2.1.7. Cetere, ke la afero estas aprezata pruvas la fakto, ke ĝis nun petis kunven-eblecon, krom APE kaj FEL, BEFA, ILEI kaj Eŭropa Klubo. Ĉu ankaŭ FLEJA ?

2.2.1.8. FLEJA prikonsideros tion kaj se necese kontaktiĝos kun M. Demonty.

2.2.1.9. FLEJA favorus la ideon, ke FEL kaj APE organizu ĉiu sian propran kongreson kaj estus preta kunlabori en ambaŭ.

2.2.2. IJK-Leuven 1982.

2.2.2.1. Gerd Jacques, nome de FLEJA, demandas ĉu FEL subtenus kaj ŝatus la organizon de "internacia vespero aŭ-tago" al kiu ĉiuj membroj povus partopreni kaj havi la okazon konatiĝi kun la laboro de la junularo.

2.2.2.2. FEL akceptas.

2.2.3. UK - 1982 ANTWERPEN (raportas RDS)

2.2.3.1. En la nuna stato la UK-preparoj ne estas tro bonaj, sed ankaŭ ne senesperigaj.

2.2.3.2. Jam estis kelkaj kontaktoj kun la direktoraro de la Zoologia Ĝardeno rilate al la kongresejoj.

2.2.3.3. La aranĝo de la loĝado komenciĝas.

2.2.3.4. La temo ankoraŭ ne estas konata, sed tio estas afero de UEA.

2.2.3.5. Verŝajne estos speciala poŝtmarko.

2.2.3.6. Emblemo ankoraŭ ne estas. La direktoro de la Art-akademio de Lier akceptis peti al siaj studentoj fari projektojn el kiuj la LKK povos elekti.

2.2.3.7. La prezidanto proponas kunvenigi la du LKK-oj (UK kaj IJK)
Aprobite, sed nun estas ankoraŭ iom frue.

2.2.3.8. Ĉu estas sufiĉe da kunlaborantoj en la LKK ?
Ankoraŭ ne. Ĉefe mankas konstanta tajpist(in)o.

2.3. INFORMILO - ĉu aldona FLEJA-paĝo ?

2.3.1. La propono de JB kompletigi INFORMILO-n per aldona paĝo de FLEJA estas principe akceptita, kvankam FLEJA disponas pri paĝo en JEN.

2.3.2. La publikigo de la protokoloj de FLEJA en la protokola parto, estu

estu konsiderata kiel transira paŝo al konstanta paĝo.

2.3.3. JB opinias ke unu ne malhelpas la alian. FLEJA tre bone povas havi paĝon kaj en JEN kaj en INFORMILO.

2.3.4. Por la aldonaj en INFORMILO, FLEJA ne bezonas specialan redaktoron. Sufiĉas ke ili donu al JB la ĉefajn punktojn kaj ekspliku al li (eĉ telefone) pri kio ekzakte temas. En tiu kazo ili tamen akceptu la stilon de JB.

3. Taskodifinoj.

3.1. Ĉiu konsentas, ke se iu tasko jam estas farata ĉu de FEL, ĉu de FLEJA, la alia ne faru ĝin duan fojon. Tial bone estus vidi kiuj taskoj jam funkcias, kiuj estas ĝamtempaj kaj kiuj devas ankoraŭ esti realigitaj.

3.1.1. JB konstatas ke en FEL vakas TURISMO kaj VARBADO.

3.2. Turismo.

3.2.1. JB opinias ke la fina celo de tiu funkcio devus esti kompleta vojaĝ-(sub)-agentejo (de ia oficiala agentejo). Bone estus, ke oni serĉu vojaĝagentejon kiu pretus kunlabori en tio.

3.2.2. La tuto normale devus esti centralizita en la Esperanto-Centro kaj funkcii kiel normala vojaĝagentejo.

3.2.3. Por la tuja estonteco, PASPORTA SERVO povus esti grava ero de la turisma servo.

3.3. Varbado.

3.3.1. En FLEJA ekzistas specialaj laborgrupoj "EKSTERAJ RILATOJ" kaj "AGADO". Ĉu FEL-varbado ne povus esti enstrukturita en unu el tiuj du?

3.3.2. Tio devas esti ebla. Priekzamenenda, do.

3.4. Kunlaboro

3.4.1. JB konstatas, ke ekzistas en ambaŭ estraroj funkcioj, kiuj, se ili pluekzistu, devus kunlabori inter si.

3.4.2.

| FLEJA | | FEL |
|---|---|---|
| Instruado | kun | Edukado |
| Eksteraj rilatoj | kun | Informado, Planado, Agado |
| Agado | ——→ transpreni ——→ | Varbado-n |

3.4.3. Ĉiu konsentas.

4. Diversaĵoj

4.1. JV aŭdis, ke la nuna BEF-ĉefdelegito intencas eksiĝi.

4.1.1. Se necese, FEL- Esperanto-Centro povus transpreni tiun taskon por BEF, kontraŭ kompenso.

4.1.2. Ni atendu la venontan BEF-kongreson.

Fino : 17.20 h.



FEL-estrar-kunsido de sabato 12 09 1981 en Antverpeno.

Ĉeestas : Edward SYMOENS, Jules VERSTRAETEN, Kristin TYTGAT, Roger DE SCHEPPER, Paul PEERAERTS kaj Jan BOVENDEERD.

Petis senkulpigon : Fernand ROOSE

Prezidas : E. SYMOENS

Protokolas : J. Bovendeerd.

Komenciĝo : 10.15 h.

T A G O R D O

1. La protokolo pri la estrar-kunsido de 13 06 1981 estas aprobita.

2. Raportado de la estraranoj.

2.1. Administrado (JB) : nenio nova.

2.2. Edukado (JB) : nenio nova.

2.3. Financoj.

2.3.1. ĝenerala (JV)

2.3.1. Pro familiaj kialoj (malsaneco ktp.), ne eblis al JV multe sin okupi pri la financoj de FEL. Li fidis al la aliaj estraranoj pri financoj kaj al la librotenisto.

2.3.2. Planado. (RDS)

RDS faris kontrolon de la librotenado kaj, kune kun PP alportis ŝanĝojn tiel ke nun eblos raporti ĉiu-monate pri nia financa situacio.

2.3.3. Librotenado (PP)

2.3.3.1. Tamen, por tiu ĉi unua fojo ne estis eble sufiĉe rapide ellabori la transiron al la nova sistemo. Li dissendos kopion de la raporto al la intersitoj.

2.3.3.2. Nun ekzistas du librotenadoj kiuj kontrolas sin reciproke, nome la antaŭa, tradicia kaj la nova, komputora.

2.3.3.3. La komputoro ankaŭ komparas aŭtomate la elspezojn kun la buĝeto kaj tiel avertas se necese.

2.3.3.4. La nova sistemo permesas pli severan kontrolon.

2.3.3.5. La prezidanto insistas pri tio, ke ĉio estu laŭleĝe en ordo.

2.3.3.6. Bona novaĵo : la ministerio anoncis la (decidon pri la) pago de la promesitaj subvencioj.

2.3.3.7. PP. opinias, ke estas nepre necese "komercigi" FEL-n. La situacio tamen ne estas tre klara, pro manko de sufiĉe da informoj flanke de UEA.

2.3.3.8. La prezidanto demandas ĉu eblas malaltigi la elspezojn.

2.3.3.9. Laŭ PP ne.

2.3.3.10. Se tiel estas, ni devas trovi la necesajn enspezojn.

2.3.3.11. S-ro Maertens preparis proponon de kontrakto FEL/UEA. La sekretario insistos pri kiel eble plej baldaŭa komuniko.

2.3.3.12. RDS volas kompletan kontrolon de la kontoj, por taŭge defendi nian sintenon vid'al vide UEA.

2.3.3.13. PP proponas instigi UEA-n al renovigo de la kontrakto kaj al nuligo de la ankoraŭ ĉiam ekzistanta de BEF/UEA.

2.3.3.14. PP plie insistas pri rapida eldono de la verketo de R. de Roover, ĉar, se ĝi kostas monon por la eldonado, ĝi poste alportos monon.

2.3.4. Fiksdataj mondeponoj.

2.3.4.1. Ĝis nun nenio envenis.

2.3.4.2. PP opinias ke unu-foja mencio de la afero en ESPERANTO PANORAMA ne sufiĉas. Bezoniĝas daŭra ripeto.

2.3.4.3. Tial li petis al Anne Tilmont verki tekston por flugfolio, kiu povos esti disdonita okaze de publikaj aranĝoj, aldonita al revuoj/bultenoj ktp.

2.3.4.4. KT opinias, ke nura dissendo aŭ disdonado ne sufiĉas. Laŭ ŝi, kaj tiurilate ŝi havas spertojn kadre de FLEJA, pli interese estus starigi budon en kunvenejoj, prizorgata de unu persono kiu povas doni la necesajn eksplikojn.

2.3.5. Esperanto-domo

2.3.5.1. Laŭ RDS LA VERDA STELO volas uzi ĉambron en unu el la supraj etaĝoj. Ĉu LVS luu ĝin de FEL ?

2.3.5.2. PP atendas ĝeneralan kontrakton kiu permesas (-u ?) difini sian starpunkton.

2.3.5.2.1. RDS pensas ankaŭ pri manĝejo por GCA (Grafika Cenro Antverpeno)

2.3.5.2.2. Efektive, ŝajnas pli bone, ankaŭ rilate al eventuala kontrolo de la ŝtataj instancoj, lasi fermita la klubejon de LVS kaj krei apartan manĝejon por GCA.

2.3.5.3.1. PP favoras la ideon, sed samtempe atentigas pri la perdo de loko por aliaj aferoj.

2.3.5.3.2. En vere, se ni volas centralizi la administradon de FEL, ankaŭ ĝi bezonos arĥivejon.

2.3.5.4. Ankaŭ FLEJA ŝatus disponi pri ĉambro.

2.3.5.5. Laŭ PP, GCA intencis lui la kela-, la tera- kaj la 2-a etaĝojn de la domo. Restas do la 1-a (LVS) kaj 3-a etaĝoj.

2.3.5.6.1. Fakte la situacio ne estas klara.

2.3.5.6.2. Oni konstatas mem, ke FEL estas preterirata, kvankam ĝi fine devus respondeci pri la tuto.



2.3.5.6.3. La domo fakte aĉetiĝis por LVS. Nek FEL, nek GCA, nek I. Hodler havas seriozajn avantaĝojn el ĝi.

2.3.5.6.4. Fakte iuj (?) decidis, eĉ sen demandi la opinion de FEL !, ke FEL luu la domon kaj plu-luu ĝin..!

2.3.5.6.5. Laŭ RDS, le kernestraro de FEL (financoj/administrado) organizu kunsidon, kies tagordo menciu nur "Esperanto-domo".

2.3.5.6.6. Tuj decidiĝas, ke tiu kunsido okazu je 10 10 1981 je 10.00 h.

2.3.5.6.7. Prepare al tiu kunsido ni insistu ĉe UEA por havi la kontraktproponon kiun preparis/-as S-ro Maertens, ĉar ja nia buĝeto dependas de tiu kontrakto.

2.3.5.6.8. La sekretario skribos al S-ro Maertens, kun kopio al UEA.

2.4. Informado, Planado, Agado.

2.4.1. Ĉi jare la Informado, Planado kaj Agado interplektiĝas kun tiu de la UK, rilate al kiu la vera informado nun komenciĝas.

2.4.2. Samkiel P. Peeraerts kaj Anne Tilmont, la prezidanto partoprenos la UEA-konferencon pri Informado, kiu okazos en oktobro en la Centra Oficejo en Rotterdam.

2.5. Kulturo.

2.5.1. FR, forestanta, raportis per letero: "Post mia cirkulero, mi ĝis nun ricevis NENION. Mi pripensas novan cirkuleron, ĉar nun la grupoj rekomencos sian agadon (almenaŭ, mi esperu tion).

2.6. Rilatoj kun la grupoj.

2.6.1. Brabanto : MTH malĉeestas

2.6.2. Limbrugo : GS "

2.6.3. Orient-Flandrujo : RB malĉeestas.

2.6.4. Okcident-Flandrujo : FR - per letero :

2.6.4.1."Mi jam havis kelkajn persanojn renkontiĝojn antaŭ kelkaj semajnoj.

2.6.4.2. Kiam mi parolis pri ĝenerala kunveno en septembro, ili dubis, opiniante la daton tro frua.

2.6.4.3 Mi nun prikonsideras kunvenon en la fino de septmebro.

2.6.4.4. Tre baldaŭ mi verkos kaj dissendos cirkuleron al ili.

3. Buĝeto.

3.1.1. RDS tre detale klarigas la diversajn punktojn de la buĝet-projekto.

3.1.2. Definitiva buĝeto povas esti pretigita nur post ricevo de la nova kontrakto UEA/FEL. Ni esperas ricevi ĝin antaŭ la venonta kunsido.

3.2.1. CED eldonas "Praktijkgids voor de VZW", tre utila laborilo.

3.2.2. RDS proponas aĉeti ĝin.

Aprobite.

4. Estonta agado

4.1. La artikoloj de JB "Ĉu havas sencon tio, kion ni faras" kaj "Ĉu aŭ ĉu ne ?", ĉi lasta rilate al la reorganizado de nia administrado, estas amendumitaj kaj fine aprobitaj.
Ili aperos en INFORMILO de septembro kiel diskuttemo por la venonta BEF-Federacia Kongreso.

4.2. Ankaŭ la proponita "aliĝilo" (vidu aldonon) estas pricipe aprobita. La ĝenerala kunsido (administrantara - ) decidu pri la apliko.

5. Rilatoj kun UEA
Ne eblas priparoli tiun puntkon nun. Ni atendu la kontrakt-proponon.

6. Eldonkonto. (vidu INFORMILO julio/aŭgusto)

6.1. Ĉu ni kreu tian konton ?

6.2. Konsidere al nia propagando por nia Ŝparkonto (Fiksdataj Mondeponoj), ni pli bone prokrastu tiun ĉi punkton.

7. Korespondaj kursoj

7.1. Kadre de la "edukado", JB proponas organizi oficialan korespondan kurson.

7.2. Li kontakiĝis kun Esperanto Centro Nederlando, kiu uzas tre valoran korespondan kurson kaj kiu konsetas pri ĝia uzo.

7.3. PP informiĝos pri la prezoj.

7.4. Dume JB redaktos leteron por trovi la necesajn tasko-korektontoj. Tiu letero estos sendita de PP al kelkaj de li kontataj kapabluloj.

8. Preparo de la administrantara kunsido de 03-04 10 1981 en Bruselo.
- vidu aldonon.

9. Test 5000/test 1987 de ESPERANTO PROGRAMITA NEDERLANDO

9.1. Envenis letero de ESPERANTO PROGRAMITA Nederland. kun propono de komuna propagandkampanjo por akiri minimume 1987 novajn lernantojn en 1987, jaro de la 100-jara datrevono de la eldono de la unua broŝuro pri Esperanto.

9.2.1. Le sekretario respondos, ke ni jes estas pretaj kunlabori en tiu rilato, sed ne nur per ESPERANTO PROGRAMITA.

9.2.2. Ni lanĉos kampanjon sur ĉiuj eblaj terenoj kaj klopodos plialtigi ne nur la lernanto-nombron sed certe ankaŭ la membro-nombron.

10. Diversaĵoj.
Nenio interesa.

Fino 17.35 h.

JB



I N V I T O

al

nia administrantara kunsido, okazonta sabaton 03 10 1981 je 15.00 h. en Bruselo, Fortstrato 35 A, 1060 Bruselo (kongresejo de BEF)

T A G O R D O

1. Fiksdataj Mondeponoj

2. Laborkalendaro - ĉu pli-oftigi la {administratantarajn kunsidojn ? / komunajn kusidojn FEL/FLEJA ?}

3. Kadro-kursoj - vidu julio/aŭgusto 2.2.

4. Kunlaborantoj al INFORMILO - vidu INFORMILO de majo.

5. Reorganizo de la administrado
vidu paĝojn XII kaj 9

6. Diversaĵoj

Aldonaj punktoj estu komunikotaj al la sekretario antaŭ la kunsido.

Estu bonvena.

JB

-----------------------------

projekto de **A L I Ĝ I L O**

Preferata grupo _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

A. Nomo _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

Naskiĝdato _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

Adreso _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

_ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

B. Membroj kunloĝantaj kun A.

| Nomoj | naskiĝdato |
|---|---|
| _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ | _ _ _ _ _ _ _ _ |
| _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ | _ _ _ _ _ _ _ _ |
| _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ | _ _ _ _ _ _ _ _ |
| _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ | _ _ _ _ _ _ _ _ |

C. Kotizoj :

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. Membro (ricevos E°-PANORAMA aŭ JEN) (1) | _ _ _ _ | X 100 = | _ _ _ |
| 2. Subten-kotizo al FEL | _ _ _ _ | X 500 = | _ _ _ |
| 3. Subtenkozizo al FLEJA | _ _ _ _ | X 500 = | _ _ _ |
| D. Donaco de minimume 1000 F estas subtrahebla de la impostoj kadre de art. 71 de la leĝo sur la direktaj impostoj. | _ _ _ _ | X1000 = | _ _ _ |
| E. Abonoj : | | | |
| 1. ESPERANTO PANORAMA (nederlandlingve) | _ _ _ _ | X 100 = | _ _ _ |
| 2. INFORMILO DE FEL (esperantlingve) | _ _ _ _ | X 100 = | _ _ _ |
| 3. JEN (nederlandlingve) | _ _ _ _ | X = | _ _ _ |
| 4. KONCIZE (esperantlingve) | _ _ _ _ | X = | _ _ _ |
| 5. ESPERANTO DE UEA | _ _ _ _ | X 350 = | _ _ _ |
| 6. KONTAKTO DE TEJO | _ _ _ _ | X 350 = | _ _ _ |
| 7. JARLIBRO DE UEA (2) | _ _ _ _ | X 360 = | _ _ _ |
| 8. HEROLDO DE ESPERANTO | _ _ _ _ | X 490 = | _ _ _ |
| 9. MONATO | _ _ _ _ | X 960 = | _ _ _ |
| | | Totalo : | _ _ _ |

Tiun totalon mi pagos : (3) O - en la konton de FEL :
402-7069801-50
O - kontante al _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _

---

(1) La membrokotizo estas BF 100 por ĉiuj kategorioj, ankaŭ por simpatiantoj.

(2) Abono al la JARLIBRO implicas INDIVIDUAN MEMBRECON de UEA kaj rajtigas rabatojn en la kotizoj de la Universalaj Kongresoj.

(3) Metu X ĉe la elektita pagmaniero.



- la bru-emulojn, diskutemulojn, jes aŭ ne politikajn (mis-)gvidantojn, homojn kiuj ŝatas sin aŭskulti;
- la tielnomitajn intelektajn "inteligentulojn", el kiuj certaj jes kunlaboras en kulturaj aferoj, sed ĉefe - ofte eĉ nur - por vidi kiel eble plej ofte sian nomon sur dokumentoj aŭ en revuoj aŭ se eble aperi sur televid-ekrano aŭ en radioprogramoj;

kiom tiam restas por vere fari valoran laboron por la socio?

Supozante ke Esperanto estas grava parto de la socio - kaj mi ne troigas ~~dirante, ke la esperantistoj certas pri tio - mi tamen devus konstati~~, ke la Esperanto-movado ankoraŭ tre malgrandas, ege malfortas. Tion pruvas la esperantistoj mem!

Konsiderante la movadanojn, la tn.aktivulojn, ni retrovas ofte malkuraĝigajn situaciojn.

Kiom ofte persono ĵus esperantistiĝinta tuj sin kredas ideala mondpliboniganto, sed same rapide malaperas de la scenejo konstatinte ke "la homaro estas malbonvola .."

Kiom ofte personoj iĝas veraj aktivuloj, sed individuaj, kiuj ekagas kaj faras aferojn, kiujn aliaj jam faris antaŭ ili, sed pri kiuj ili nenion scias pro la bona kialo ke ili ne sufiĉe informiĝis.

Kiom ofte individuaj aktivuloj jes faras bonan laboron, sed -jes aŭ ne intence- ignoras la movadon, rifuzas organizitan agadon; personoj kiuj ĉiam pretas "konsili" (kaj eĉ riproĉi se iliaj konsiloj ne estas senkondiĉe akceptitaj), sed neniam havas tempon nek emon kunlabori.

Kiom ofte ni ne vidas ofte revenintajn nomojn en revuoj ktp, kies posedanto neniam aŭ nur tre malofte aperas, ĉar tempo mankas. Kiom da esperantistoj ne esperantistiĝis ĉefe tial?

Kaj denove eliminante tiujn nemalhaveblajn mi-um-em-ul-ojn, kiom restas por fari la veran laboron ?
Nur kelkaj! ege malmultaj, eĉ ne 10 el 1000 !

Fakte do Esperanto en sia nuna socia formo ne taŭgas por movi la grandan publikon. Per Esperanto oni ankoraŭ ne povas (aŭ ĉu temu pri kuraĝo?) vere brili, vere elstari, ĉar tiuj homoj kiuj vere brilus/as ne sin montras publike.

Kiun vojon sekvi do ? Ĉu daŭrigi nian mem-gloradon surpapere kaj resti kaŝitaj ? Ĉu eniri la "gregon" kaj vere brili ? Ĉu ne instigi tiujn profetojn, kiuj daŭre instigas al propagando buŝ-al-orele, mem eliri kaj propagandi ?

Aŭ ... ĉu ni eble plej bone elvenu el nia izoliteco, malsuprenvenu de nia piedestalo-tiel-ŝatata kaj proponu nian helpon al la junuloj ? Mi jes diras helpon kaj emfazas tion, ne konsilojn (kiujn plenkreskuloj ĉiam tiel volonte donas al junuloj). Ne, tion ne, sed nian kunlaboron en ilia programo ?

Tamen, ni ne perdu el la okuloj la nunan socian situacion.

Kunvenigi homojn ne plu facile eblas, eble jes al tiuj okazoj, kiuj *troviĝas ekster la televidaj programoj kaj kiuj permesas esti vidata* sen postuli tro da peno. Iom da peno, jes, se nur ne mensa aŭ intelekta.

Al la amaso sufiĉas pano kaj ludoj, jam sciis Julio Cezaro.

Nuntempe homoj, kiuj sin interesas al la socia kultura vivo, plej ofte faras tion legante. Ili pretas aĉeti librojn, broŝurojn, gazetojn pri ĉiuj eblaj temoj kaj legi ilin hejme aŭ dum-vojaĝe. Ili - ne ĉiuj, sed tamen - estas pretaj kunlabori surpapere, hejme aŭ oficeje, sed eliri el sia domo, ne petu de ili.

Ŝajnas al mi, ke ĝuste tiuj homoj povas esti interesaj por ni. Do, ni sekvu la alvokon de UEA-prezidanto Maertens : "EKSTEREN !" kaj produktu interesajn revuojn, broŝurojn, librojn kaj prilaboru la libromerkaton por ke niaj verkoj "vere" atingu la publikon.

Por tio ni eble antaŭ ĉio klopodu kunigi ĉiujn eblajn fortojn, serĉu kunlaboron kun aliaj Esperanto-organizoj en nia lando kaj trovi ĝeneralan laboron. Planoj jam ekzistas. Nia prezidanto cetere jam preparis tre detalan agad-programon. Ni nur zorgu, ke ĝia realigo ne estu prokrastita. La unua paŝo plej multe valoras; ni metu ĝin sufiĉe rapide por ke ni ne mistrafu la venontan Universalan Kongreson.

En tiu senco ŝajnas al mi, ke jes, tio kion ni faras, povas havi sencon.

JB

---------------------

D I S K U T T E M O

por nia administrantara kunsido okaze de la 2-a Federacia Kongreso de BEF, je 03 k. 04 10 1981 en Bruselo.

Al tiu ĉi teksto kunlaboris la estraroj de FEL kaj FLEJA, S-roj G. Maertens, P. Peeraerts kaj I. Durwael.

---



ĈU AŬ ĈU NE ?

La ideo pri reorganizado de FEL jam ne plu estas nova. Ĝi fakte rezultis el sugestoj de pluraj grupoj. Tamen, grave estas trovi bonan formulon.

Ĉefa demando fakte estas : ĉu, jes aŭ ne, ni reorganiziĝu ?

Jen propono :

. Ni povas komenci per la centralizado de la membro-kotiz-enkasigo. Dank'al la la komputoro, pri kiu ni povas disponi, tio ne devas kaŭzi grandan problemon.

Avantaĝoj ja estas :

Centralizita administrado permesos havi ĝeneralan superrigardon sur la membraro kaj eviti i.a. certan membro-perdon. Nun FEL dependas de la grupaj kasistoj. Se tiuj ĉi bone sekvas la aferojn kaj ĝustatempe memorigas kaj instigas al kotiz-repago, ne estas problemo. Tamen, se tio ne estas la kazo, la afero iĝas necerta. Ja nur malmultaj estas tiuj, kiuj spontanee proponas kotiz-pagon.

Ĉu do la lokaj grupoj/kernoj malaperu ? Certe ne ! Male, forpreno de la administra tasko pri financ-prizorgado povus favore efiki en la organiza laboro, pro pli da homfortoj.

Problemeto povus esti tiu de la klubidentigo. Normale la komputoro permesas klasigi la adresojn laŭ-komunume, sed ankaŭ laŭ-grupe ? Pensu ekzemple pri tiuj lokoj, kie estas pluraj grupoj.

Tio ŝajnas esti solvebla petante al la membroj indiki sian preferatan grupon.

Ĉu aliflanke la grupaj kasistoj ne plu okupu sin pri la kotizoj ? Jes ja, tamen ! Ĉar malgraŭ ĉio restas homoj, kiu preferas pagi jes al grupa kasisto, sed ne al ĝenerala konto (por ne paroli eĉ pri tiuj, kiuj aliĝis por komplezi al la kasisto aŭ alia membro de la grupo). Aliflanke, ĉiam estas helpo-bezonantoj, ekzemple maljunuloj, kiuj ne plu povas plenigi slipon aŭ ĝirilon, sed kiuj tamen restas fidelaj al la movado.

Nepre evitende estas forgesi tiujn membrojn aŭ ĝenerale eĉ -ciujn malnovajn/maljunajn membrojn, kiuj eble dum jaroj restis fidelaj, eble eĉ finance subtenis la movadon. Maljuste estus senigi ilin de niaj novaj bultenoj kaj kondamni ilin al plena izoliteco rilate al la Esperanto-movado kaj tio nur pro la fakto, ke ili ne repagis aŭ ne kapablis plen-

igi ian dokumenton.

En tiu rilato ni do ankaŭ trovu apartan, kontentigan solvon, ekzemple tian de daŭra alsendo de niaj novajbultenoj. (Komparu ekzemple kun BOND ZONDER NAAM/MOVADO SEN NOMO, kiu alsendas al ĉiu interesito daŭre kaj senpage siajn sloganojn ktp.)

Kompreneble, por resti en la kadro de nia reorganizado, la grupaj kasistoj transpagu la kompletan kotizon kaj alsendu la plenigitajn slipojn (vidu sube) al FEL - Esperanto-Centro.
Proponite de Esperanto-Centro estas, ke la kasistoj daŭrigu sian normalan laboron rilate al la kozitoj unue kaj ke E°-Centro ekagu ekde februaro/marto por sendi la memorleterojn ktp.

Kaj kio pri la normalaj enspezoj por la grupoj?

Ni povus interkonsenti jene :

E°-Centro :

- klasigu la membrojn laŭ-grupe kaj sendu al la grupaj kasistoj liston de ilia membraro,
- kalkulu la totalan kotiz-enkasigon kaj
  a) ĉu pagu iun % al la grupaj kasistoj
  b) ĉu pagu nenion el la kotizoj, sed antaŭvidu la financigon de la grupaj aktivecoj
  c) ĉu kàj pagu iun % kàj antaŭvidu subvencion.
  (FLEJA jam favoras c.)

b kaj c tamen necesigus la starigon de speciala kontrol-komisiono rilate al la postulotaj subvencioj.

Avantaĝa sistemo plie povus esti :

- absolute unuformigita kotizo, t.e. unu-nura fiksa prezo por ĉiuj kategorioj
- malligado de la kotizoj de la abonoj
- perado de FEL por la abonoj al la ĉefaj revuoj, jes aŭ ne tra SONORILO
- centralizado de la diversaj klubaj revuoj/bultenoj ekzemple en INFORMILO. Kvankam INFORMILO origine kreiĝis kiel kadro-bulteno, ĝi povus esti la unua paŝo al vera revuo, kiel jam proponite de nia prezidanto (vd. INFORMILO julio/aŭgusto).

Se la grupoj perdus ion el la kotizoj (io, kio ankoraŭ ne estas certa), ili povus regajni tion en la malpliiĝo aŭ la forigo de la eldon- kaj afranko-kostoj rilate al propra revuo. Cetere INFORMILO normale aperas -ciumonate, do pli regule ol kiuj ajn kluba bulteno.



Aliflanke INFORMILO povus iĝi pli interesa pro kunlabor(et)o (?) de la grupaj redaktoroj.

Unuformigita kotizo, libera de abonoj, eble instigas al pli facila aliĝo, dum perado de FEL por la ĉefaj revuoj - jes aŭ ne tra SONORILO - estus plia paŝo al CENTRA ADRESO. Ĉu vi memoras nian intencon havi nur unu solan adreson por ĉio, kio koncernas Esperanton? Tio cetere ankaŭ estus plifaciligo por membroj kaj grupoj.

Kompreneble la risko ne malestas, ke tiel ni ne atingu la minimuman kvanton por la kolektivaj abonoj al ESPERANTO de UEA, sed ĉu la afero ne valoras la riskon klopodi ?

Plia avantaĝo estas, ke kiam la membraro estas klasigita laŭ-komunume, pli facile estos trovi tiujn lokojn, kie eblus krei plian kernon.

Ankaŭ komuna redaktado de la revuo eble permesos malkovri ankoraŭ-ne-konatajn valorajn elementojn.

Ĝenerala abon(ebl)o al INFORMILO eble ankaŭ malfermos la vojon al pli bonaj rilatoj kaj konduki al pli bona inter-kun-laboro, certe ankaŭ kun la junularo. Ni jam konstatis, ke pro nura nekompleta informado, pro nura nescio rilate al samtempa agado FEL/FLEJA, certaj aferoj okazas ĉu pretere/apude, ĉu simple duoble,el kio sekvas nepra perdo, ne nur de tempo, sed certe kaj ĉefe de laborfortoj.

INFORMILO povus helpi al pli-bonigado tiu-flanke, ebligante kunigadon de ĉiuj eblaj laborfortoj kaj al prudenta, pli efika ellaborado de niaj komunaj agad-programoj.

## UNUAJ PAŜOJ FARENDAJ.

Ni kreu tre detalan aliĝilon en kiu ĉiu membro tre klare vidos la eblecojn kaj povos libere elekti la deziraton, apartigante kotizon kaj abonojn.
Tiu aliĝilo antaŭvidu por ĉiu la naskiĝdaton, kio permesos al ESPERANTO CENTRO klasigi la membraron laŭ-aĝe, ne nur profite al FLEJA, sed ankaŭ por ebligi eventualan daŭran alsendon de niaj novaj-bultenoj (vidu supre).

Ĉiuj grupoj kaj kursgvidantoj absolute kaj tre akurate kunlaboru :

- 1. la grupoj :
  traserĉu siajn membrolistojn kiel eble plej fore en la pasinteco por (re)trovi ĉiujn membrojn kiujn ili iam (?) havis kaj komuniku al E°-Centro kiel eble plej kompletan liston.
- 2. la kursgvidantoj :
  tre fidele kaj akurate ensendu la listo(j)n de siaj kursanoj kaj,

se ili ricevis la unuan kotizon, transpagu ĝin al E°-Centro.

Tio permesos al E°-Centro havigi al ĉiuj ekzemple la novembran numeron de ESPERANTO PANORAMA,kune kun klariga letero, aliĝformularo kaj ĝirilo.

Alivorte, ni ĉiuj kune preparu nin dece kaj kuraĝe al vasta varb-kampanjo, jam inter iamaj esperantistoj kaj tiel bone preparu ankaŭ la venontan Universalan Kongreson en Antverpeno.

Rilate al antaŭ-kongresa agado, ni eble trovos kelkajn indikojn en INFORMILO julio/aŭgusto.

JB

-------------------------

Io el la kadro-kursoj.

En la kurso pri literaturo, S-ro F. Roose atentigis nin pri la alloga maniero, laŭ kiu Zamenhof sukcesis internaciigi proverbojn el diversaj lingvoj. Li havigis al ni kvanton da tiaj proverboj por publikigo en nia bulteno, cele al pli-riĉigo de nia lingvo-kono.

Jen kelkaj el ili :

| | |
|---|---|
| Por Paŭlo sperto, por Petro averto : | Een schip op 't strand, een baken in zee. |
| Vivu l' stomako laŭ l'stato de l' sako. | Men moet de tering naar de nering zetten. |
| Kiel akirite, tiel perdite. | Zo gewonnen, zo geronnen. |
| Kiu groŝon ne respektas, riĉecon ne kolektas. | Wie het kleine niet eert is het grote niet weerd. |
| Kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas. | Wie met pek omgaat, wordt erdoor besmet. |
| Ni forgesas averton, ni memoras la sperton. | Ondervinding is de beste leermeester. |
| Kio fariĝis jam ne fariĝos. | Gedane zaken nemen geen keer. |
| Bastono batas, bastono resaltas. | Wie kaatst moet de bal verwachten. |
| Du militas, tria profitas. | Twee honden vechten om een been, een derde loopt er ras mee heen. |
| Pli bona apuda najbaro ol frato post arbaro. | Beter een goede buur dan een verre vriend. |

Jen do, ĝis la venonta !